

**BARDELL**

KONTRAŬ

**PICKWICK.**

---

Proceso eltirita el la romano "Pickwick Papers,"

DE

CHARLES DICKENS.

DRAMIGITA KAJ ESPERANTIGITA

DE

WILLIAM MORRISON, F.B.E.A.

---

London :

La Tria Kongreso (Cambridge, Aug. 10—17, 1907).  
13, Arundel Street, Strand, W.C.

*Danke  
salutas*

**BARDELL**

KONTRAŬ

**PICKWICK.**



---

Proceso eltirita el la romano **“Pickwick Papers,”**

DE

CHARLES DICKENS.

DRAMIGITA KAJ ESPERANTIGITA

DE

**WILLIAM MORRISON, F.B.E.A.**

---

**London :**

La Tria Kongreso (Cambridge, Aug. 10—17, 1907).  
13, Arundel Street, Strand, W.C.

EDINBURGO,

*Majo, 1907a.*

## ANTAŬPAROLO.

GESAMIDEANOJ,

Por la profito de tiuj el niaj alilandaj geamikoj, kiuj ne konas la verkojn de nia fama Angla romanisto, mi pensas, ke estus dezirinde diri kelkajn vortojn pri la okazoj, kiuj alkondukis al la proceso, nun tradukita en Esperanton.

Charles Dickens (Ĉarlz Dikenz) naskiĝis en Landport, Anglujo, en la jaro 1812a. Lia unua okupado estis tiu de parlamenta raportisto, sed la granda sukceso de lia unua verko—"Pickwick Papers,"—el kiu la fama proceso estas eltirita—igis lin alpreni la literaturan profesion. Inter liaj plej bonaj libroj estas "Nicholas Nickleby," "David Copperfield," kaj "Oliver Twist." Dickens estis esence humoristo, sed li ankaŭ forte skribis kontraŭ multe da socialaj malbonoj. Li amis priskribi la vivadon kaj morojn de la meza kaj malalta klas-rangoj, speciale de tiuj de Londono kaj li estis majstro de nova literatura skolo. Li mortis en la jaro 1870a. En "Pickwick Papers" Dickens rakontas la aventurojn de Sinjoro Pickwick—naiva, bonkora, gajega, riĉa, maljunulo—kiun ĉiuj bonuloj amis kaj ĉiuj friponuloj penis trompi. Kiam li sin trovis en Londono, li loĝadis kun vidvino, nomita Sinjorino Bardell, kaj ĉar li estis ĉiam bonkora kaj simpatia, Sino. Bardell imagis ke ŝi inspiras en lin senton de pli ol amikeco por si. Ĉirkau tiu ĉi

tempo Sro. Pickwick havis la ideon dungi serviston—la nekompareblan Sam Weller—sed ne sciante kion la vidvino opinios pri la propono, li penis per ruzaj demandoj eltrovi, ĉu ŝi kontraŭstaros. Sino. Bardell intence malkomprenas la signifon de liaj vortoj kaj pretekstas, ke ili estas edziĝpropono, kaj cirkaŭprenante per la brakoj la kolon de la senkulpa sinjoro, ŝi ĝoje ekploregas. En tiu ĉi embarasa situacio Sro. Pickwick estas trovata de sia amiko Sro. Winkle, kiu poste estas alvokata kiel atestanto en la proceso pro malplenumo de edziĝpromeso kiun Sino. Bardell faras kontraŭ Sro. Pickwick. La okazo, kiun la malfeliĉa Winkle aludas dum sia ekzameno per la advokato de la plendantino, kaj kiu ruinigas la proceson de lia amiko, estis tre senkulpa afero. Sro. Pickwick, alveninta en Ipswich, loĝis en tre granda antikva hotelo kaj, post la vespermanĝo, li iris kuŝiĝi. Dum li senvestigis sin, li trovis, ke li lasis sian multekostan oran poŝhorloĝon sur la tablo en la manĝoĉambro. Li iras ĝin serĉi, retrovas ĝin, sed revenante, li ne povas facile trovi sian dormoĉambron en la labirinto de irejoj kaj ŝtuparoj. Fine, li eniras en tiun kiu, li kredas, estas lia propra ĉambro kaj estas gratulanta sin pri sia bonŝanco, kiam li ekvidas antaŭ la spegulo mezaĝan sinjorinon, okupegatan kombi ŝian postan hararon. Sro. Pickwick retiras sin post kurteneĝon, kaj sekvas tre ridinda sceno, en kiu li penas klarigi al la kolerega Sinjorino sian ĉeeston en ŝia ĉambro. Tiu ĉi okazo decidigas la ĵurintaron kontraŭ Sro. Pickwick kaj ili juĝas, ke li pagu monpunon al la vidvino, sed li, en granda indigno, iras al la malliberejo plivole ol pagi la monpunon.

Per tiuj ĉi vortoj mi prezentas mian humilan tradukon de la fama proceso al la Mondo Esperantista.

WILLIAM MORRISON.

## DRAMPERSONARO.

*La Juĝisto.*

\* *Serĝento Buzfuz*, advokato por la plendantino.

*Sinjoro Skimpin*, subadvokato por la plendantino.

*Serĝento Snubbin*, advokato por la defendanto.

\* *Sinjoro Phunky*, subadvokato por la defendanto.

*Sinjoro Cluppins*, atestantino.

\* *Sinjoro Winkle*, atestanto.

\* *Samuel Weller*, atestanto.

*Oficisto de la Juĝejo.*

*Jurintaro.*

*Ĉeestantaro.*

\* *Antikva honora titolo donata al anglaj advokatoj*

\* *Phunky=Funki.*

\* *Winkle=Uinkul.*

\* *Weller=Ueller; sed li mem elparolas ĝin Veller.*

*Sceno.—La juĝejo. Antaŭ la juĝista seĝo staras tablo, dekstre estas la ĵurintarejo kaj maldekstre la atestantejo.*

*Eniras Serĝento Buzfuz kaj Sro. Skimpin, sekvataj tuj de Serĝento Snubbin kaj Sro. Phunky.*

*La ĉeestantaro babilas senĉese pri la proceso.*

*Oficisto. Silentigu!*

*(Eniras la juĝisto kaj ĉiuj stariĝas ĝis li sidiĝis).*

Silentigu! BARDELL kontraŭ PICKWICK!

*Buzfuz. Mi agas por la plendantino, via moŝto.*

*Juĝisto. Kiu estas kun vi, frato Buzfuz?*

*(Sro. Skimpin leviĝas kaj kline salutas).*

*Snubbin. Mi aperas por la defendanto, via moŝto.*

*Juĝisto. Ĉu estas iu kun vi, frato Snubbin?*

*Snubbin. Sro. Phunky, via moŝto.*

*Juĝisto (skribante la nomojn en sian notlibreton kaj legante dum li skribas). Serĝento Buzfuz kaj Sro. Skimpin por la plendantino; por la defendanto Serĝento Snubbin kaj Sro. Monkey.\**

*Phunky. Petante la pardonon de via moŝto—  
“Phunky!”*

*Juĝisto. Ho! Tre bone! Mi neniam antaŭe havis la plezuron aŭdi la nomon de la sinjoro. (Sro. Phunky kliniĝas kaj ridetas, kaj la juĝisto same faras. Poste Sro. Phunky konfuziĝas). Nu, antaŭen!*

*Oficisto. Silentigu!*

*Buzfuz. Neniam dum la daŭro de mia profesia sperto, neniam de la unua momento kiam mi turnis min al la*

---

\*Monkey=Simio en Angla lingvo. Phunky=timemega.

studado kaj praktikado de la leĝoscienco, mi alproksimiĝis al proceso kun sentoj de tiel profunda kortuŝeco aŭ kun tiel serioza sento de respondeco—respondeco, mi diras,—kiun mi neniam estus povinta elporti se mi ne estus estinta subtenata per konvinkiĝo tiel forta, ke ĝi fariĝis pozitiva certeco, ke la vero kaj la justeco, aŭ, alivorte, la proceso, de mia multe difektita kaj plej subpremita klientino, devas superi ĉe la altanima kaj inteligenta dekduo da viroj, kiujn mi nun vidas en tiu ejo antaŭ mi.

Tiu ĉi estas proceso pro malplenumo de edziĝpromeso pri kiu la monpuno estas metita je mil-kvin-cent funtoj sterlingaj. Nun, kiaj estas la faktoj kaj cirkonstancoj de la okazo? Tiujn faktojn kaj cirkonstancojn vi aŭdos detale de mi, sinjoroj, kaj ili estos pruvitaj de la nekulpigebla virino, kiun mi enmetos en tiun ejon antaŭ vi. (*Li frapegas sur la tablon kaj poste daŭrigas per dolĉa voco*).

La plendantino, sinjoroj, la plendantino, estas vidvino; jes, sinjoroj, vidvino! La mortinta Sro. Bardell, ĝuinte dum multe da jaroj la estimon kaj konfidadon de sia regnestro, kiel unu el la gardantoj de liaj reĝaj rentoj, glitis preskaŭ nesenteble el la mondo por serĉi aliloke tiun ripozon kaj pacon, kiujn impostejo neniam povas havigi. Kelkatempe antaŭ sia morto li estis stampinta sian figuron sur knabeton. Kun tiu ĉi knabeto—la sola restaĵo de sia foririnta akcizisto—Sino. Bardell eliĝis el la mondo kaj amindumis la kvietecon kaj trankvilecon de Goswell Strato; kaj tie ĉi ŝi enmetis en la fenestron de sia antaŭflanka ĉambro skribitan kartegon surhavantan tiun ĉi surskribon—“MEBLITAJ ĈAMBROJ POR FRAŬLO, DEMANDU INTERNE.”

*Ĵurinto.* Ĉu estis dato sur ĝi, sinjoro?

*Buzfuz.* Ne estis dato, sinjoroj, sed mi estas komisiita diri, ke ĝi estis metita en la fenestron de la ĉambro de la plendantino ĝuste antaŭ tri jaroj. Mi petegas la atenton de la ĵurintaro pri la vortaĵo de tiu ĉi dokumento. “*Meblitaj ĉambroj por Fraŭlo.*” La opinioj de Sino. Bardell pri la kontraŭa sekso formiĝis de longatempa observado de la netakseblaj ecoj de ŝia perdita edzo. Ŝi havis nenian timon, ŝi havis nenian malfidon, ŝi havis nenian suspekton; ĉio estis konfido. “Sro. Bardell,” diris la vidvino, “Sro. Bardell estis honorinda viro; Sro. Bardell estis promesplenumanta viro; Sro. Bardell ne estis trompulo; Sro. Bardell mem estis iam fraŭlo; de fraŭloj mi esperas protektadon, helpadon, komforton kaj konsoladon; per fraŭloj mi senĉese vidosis ion, kio rememorigos min pri tio, kio estis Sro. Bardell kiam li unue akiris mian junan kaj neprovitan amon; al fraŭlo do miaj loĝejoj estos luigitaj.” Incitata per tiu ĉi bela kaj kortuŝanta impulso, la sola kaj ĉagrenata vidvino forviŝis siajn larmojn, mebligis sian unuan etaĝon, premegis la senkulpan knabon kontraŭ sian patrinan bruston kaj enmetis la kartegon en la fenestron. Ĉu ĝi tie longe restadis?

Ne! la serpento viglis, la eksplodilo estis sternita, la mino estis pretigita, la subfosisto kaj ministo laboradis. Antaŭ ol la kartego estis tri tagojn en la fenestro—tri tagojn, sinjoroj—estaĵo, rekta sur du kruroj, kaj havanta la tutan eksteran mienon de homo kaj ne de monstro, frapis sur la pordon de la domo de Sino. Bardell. *Li demandis interne.* Li luis la loĝejon, kaj la sekvintan tagon li eniris en ĝin kiel loĝanto. Tiu ĉi viro estis Pickwick—Pickwick, la defendanto. Pri tiu ĉi viro, Pickwick, mi malmulton diros; la temo prezentas malmultajn logaĵojn; kaj mi, sinjoroj, ne estas la viro, nek vi, sinjoroj, la viroj, kiuj ĝuegus la rigardadon de naŭz-



anta senkoreco kaj de sistema kanajleco. Mi diras “*sistema kanajleco*,” sinjoroj, kaj kiam mi diras “*sistema kanajleco*,” mi diru al la defendanto, Pickwick, se li estas en la juĝejo—kaj oni sciigis min, ke li ja estas—ke estus estinta pli dece, pli konvene, laŭ pli bona juĝo kaj laŭ pli bona gusto, se li estus forrestinta.

(*Pickwick faras signojn de malkonsento*).

Mi diru al li, sinjoroj, ke iaj gestoj de malkonsento aŭ malaprobo, kiujn li povas montri en tiu ĉi juĝejo, ne taŭgos antaŭ vi; ke vi scios kiamaniere taksi ilin, kiamaniere ŝati ilin; kaj mi diru plie al li, kiel lia moŝto diros al vi, sinjoroj, ke advokato dum la plenumo de sia devo al sia kliento ne devas esti timigata aŭ subpremata, kaj, ke ia provo fari la unuan, aŭ la lastan, reagos sur la kapon de la provinto—li estu plendanto aŭ defendanto, lia nomo estu Pickwick, aŭ Noakes, aŭ Stokes, aŭ Stiles, aŭ Brown, aŭ Thompson!

Mi almontros al vi, sinjoroj, ke dum du jaroj Pickwick loĝadis konstante kaj senintermanke en la domo de Sino. Bardell. Mi almontros al vi ke Sino. Bardell dum tiu tuta tempo servis lin, zorgis pri liaj komfortoj, kuiris liajn manĝaĵojn, kunmetis lian tolaĵon por la lavistino, flikis, aerumis kaj preparis ĝin por portado, kaj, unuvorte, ĝuis lian plej plenan fidon kaj konfidon. Mi al vi almontros, ke li ofte donacis duonpencojn kaj, je kelkaj okazoj, eĉ duonŝilingojn, al ŝia knabeto; kaj mi pruvos al vi per atestanto, kies atestaĵon mia klera amiko nepre ne povos malfortigi aŭ refuti, ke, unufoje, li frapetis la knabon sur la kapo, kaj demandinte, ĉu li estis gajninta antaŭ nelonge iujn ŝtonpilkojn,\* li uzis tiun ĉi rimarkindan esprimon: “Kiel vi ŝatus havi alian patron?”

---

\* Pilketoj el ŝtono per kiuj Anglaj knaboj ludas la ludon nomitan “marbles.”

Mi pruvigos al vi, sinjoroj, ke, antaŭ ĉirkau unu jaro, Pickwick subite komencis forestadi de la domo dum longaj intertempoj, kvazaŭ kun la intenco forrompi iom post iom de mia klientino; sed mi ankaŭ almontros al vi, ke lia decido ne estis tiam sufiĉe forta, aŭ ke liaj pli bonaj sentoj venkis, se pli bonajn sentojn li havas, aŭ ke la ĉarmoj kaj talentoj de mia klientino superis kontraŭ liaj neviraj intencoj, pruvante al vi ke, unuokaze, kiam li revenis de la kamparo, li klare kaj nete proponis edzecon al ŝi, antaŭe tamen speciale zorginte, ke ne estu ia vidanto je ilia solena kontrakto; kaj mi estas en stato por pruvi al vi laŭ la atesto de unu lia amiko—plej kontraŭvola atestanto, sinjoroj,—ke tiun matenon li estis trovata de li, tenante en siaj brakoj la plendantinon kaj penante trankviligi ŝian agitecon per siaj karesoj kaj amikaĵoj. Kaj nun, sinjoroj, nur unu vorton plie. Du leteroj estas pasintaj inter la du personoj, leteroj, kiuj, oni konsentas, estas skribitaj per la mano de la defendanto kaj kiuj ja diras volumojn. Tiuj leteroj ankaŭ elmontros la karakteron de la viro. Ili ne estas malkaŝaj, elokventaj, fervoraj skribaĵoj, elspirantaj nenion krom la lingvaĵo de amema alligo. Ili estas kaŝaj, ruzaj, sekretaj komunikaĵoj, sed feliĉe multe plimulte konkludigantaj, ol se ili estus verkitaj per la plej elokventa lingvaĵo kaj per la plej poeta fantazio, leteroj kiujn oni devas rigardi per singardema kaj suspektema okulo—leteroj kiuj estis evidente intencitaj de Pickwick en tiu tempo por erarigi kaj trompi iajn aliajn personojn en kies manojn ili povus eble enfali. Permesu ke mi legu la unuan. “Ĉe Garroway, je la dekdua horo. Kara Sino. Bardell. Kotletegojn kaj tomatsaŭcon. Via Pickwick. . . .” Sinjoroj! Kion signifas tio ĉi? “Kotletegojn kaj tomatsaŭcon! Via Pickwick” *Kotletegojn!* Kompata ĉielo! kaj *tomatsaŭcon!* Sinjoroj, ĉu la feliĉeco de sentema kaj konfidemano devas esti trivialigita per tiaj malprofundaj artifikoj?

La dua havas nenian ajn daton, kio estas per si mem suspektiga. “Kara Sino. Bardell. Mi ne revenos hejmen ĝis morgaŭ. Malrapida veturilego.” Kaj poste sekvas tiu ĉi rimarkinda esprimo—“Ne zorgu pri la litvarmigilo.” *La litvarmigilo!* Nu, sinjoroj, kiu ja zorgas pri varmigilo? Kiam la spiritpaco de viro aŭ virino estis rompita aŭ maltrankviligita per varmigilo, kiu estas, en si mem, sendanĝera, utila—kaj, mi aldonos, komfortiga objekto de doma meblaro? Kial Sino. Bardell estis tiel fervore petegita ne ekscitiĝi pri tiu ĉi varmigilo, se ne pro tio, ke tio estas nura kovrilo por kaŝita fajro—nura anstataŭo por ia amema vorto aŭ promeso, ruze fabrikita de Pickwick por lia pripensadita forlaso, kaj kiun mi ne estas en stato por klarigi?

Kaj kion signifas tiu ĉi aludo al la malrapida veturilego? Malgraŭ io kion mi scias, tio povus esti aludo al Pickwick mem, kiu sendube estas estinta kriminale malrapida veturilego dum tiu ĉi tuta afero, sed kies rapideco estos nun, tre neatendite, pliigata, kaj kies radoj, sinjoroj, estos tre baldaŭ ŝmirigataj de vi. Sed sufiĉe da tio ĉi, sinjoroj, estas malfacile rideti kun dolora koro, estas malbone ŝerci, kiam niaj plej profundaj simpatioj estas vekitaj. La esperoj kaj estontaĵoj de mia klientino estas ruinigitaj, kaj diri, ke ŝia okupado estas ja foririnta, estas neniel parolformo. La kartego estas forigita—sed ne estas loĝanto. Akceptindaj sinjoroj preterpasas kaj repreterpasas—sed estas nenia invito, ke ili demandu interne aŭ ekstere. Ĉio estas mallumego kaj silento en la domo; eĉ la voĉo de la ido estas kvietiginta; liaj infanaj ludoj estas nerigardataj kiam ploras lia patrino. Sed Pickwick, sinjoroj, Pickwick, la senkora detruinto de tiu ĉi hejma oazo en la dezerto de la strato Goswell, Pickwick, kiu antaŭenvenas hodiaŭ antaŭ vin kun sia senkora tomat-saŭco kaj varmigilo, Pickwick ankoraŭ levas sian kapon

kun neruĝiganta senhonteco kaj rigardadas sen sopiro la ruinon, kiun li faris.

Monpuno, serioza monpuno, estas la sola puno kiun vi devas kaŭzi al li, la sola rekompenco, kiun vi povas aljuĝi al mia klientino. Kaj por tiu monpuno, ŝi nun turnas sin al klerega, altanima, prave sentanta, konsciencia, senpasia, simpatiema, pripensadanta ĵurintaro el siaj civilizitaj samlandanoj.

*(Serĝento Buzfuz sidiĝas kaj tuj restariĝas).*

Voku Elizabeton Cluppins !

*(Sino. Cluppins eniras en la atestejon).*

Sino. Cluppins, mi petas ke vi trankviliĝu.

*(Ŝi tuj ekploregas kaj ŝajnas preta sveni).*

Ĉu vi memoras esti estinta en la posta ĉambro de Sino. Bardell je speciala mateno de lasta Julio, kiam ŝi estis senpolviganta la ĉambron de Sro. Pickwick ?

*Sino. Cluppins.* Jes, via moŝto, kaj viaj ĵurintaj moŝtoj, mi memoras.

*Buzfuz.* La vivĉambro de Pickwick estis antaŭe sur la unua etaĝo, mi kredas ?

*Sino. Cluppins.* Jes, ĝi estis.

*Juĝisto.* Kion vi faris en la posta ĉambro, Sino. ?

*Sino. Cluppins.* Via moŝto kaj viaj ĵurintaj moŝtoj mi ne vin trompos.

*Juĝisto.* Vi bone faros ne tion fari, sinjorino.

*Sino. Cluppins.* Mi tie estis nesciate de Sino. Bardell, mi estis foririnta kun korbeto por aĉeti tri funtojn da ruĝaj ren-terpomoj kiuj kostis du kaj duonon pencojn po tri funtoj, kiam mi vidis duonfermitan la stratpordon de Sino. Bardell. Mi enmarŝis, sinjoroj, nur por diri bonan matenon kaj mi supreniris la ŝtuparon kaj eniris en la

postan ĉambron. Sinjoroj, estis la sono de voĉoj en la antaŭa ĉambron kaj . . .

*Buzfuz.* Kaj vi aŭskultis, mi kredas, Sino. Cluppins.

*Sino. Cluppins.* Petante vian pardonon, sinjoro, mi malestimus la agon. La voĉoj estis tre laŭtaj, sinjoro, kaj ili trudis sin je miajn orelojn.

*Buzfuz.* Nu, Sino. Cluppins, vi ne aŭskultis sed vi aŭdis la voĉojn. Ĉu unu el tiuj voĉoj estis tiu de Pickwick?

*Sino. Cluppins.* Jes, sinjoro, ĝi estis.

*Buzfuz.* Kaj al kiu ĝi estis direktata?

*Sino. Cluppins.* Al Sino. Bardell, via moŝto.

*Buzfuz.* Kaj kion diris Pickwick al Sino. Bardell?

*Sino. Cluppins.* Mi aŭdis lin diri al Sino. Bardell, "ĉu vi pensas, ke estus multe plimultekoste provizi por du personoj ol por unu?"

*Buzfuz.* Kaj kion respondis Sino. Bardell?

*Sino. Cluppins.* Ŝi respondis, "Tio dependus de tio ĉi, ĉu la persono estus ŝparema kaj zorgema aŭ ne."

*Buzfuz.* Kaj kion diris poste Pickwick?

*Sino. Cluppins.* Li diris ke la persono pri kiu li pripensis, posedas tiujn ecojn kaj ke tio ŝparos al ŝi multan zorgon.

*Buzfuz.* Ĉu Sino. Bardell respondis al tio?

*Sino. Cluppins.* Ho, jes! ŝi diris, tre kortuŝite, ke li estas tre bona al ŝi kaj tre sentema, pripensante pri ŝia soleco.

*Buzfuz.* Kredeble! Kaj kion plue diris Pickwick?

*Sino. Cluppins.* Li diris, "Jes, certe, mi neniam pripensis pri tio." Tiam li diris, ke kiam li estos en la urbo ŝi ĉiam havos iun kiu sidos kun ŝi. Kaj Sino. Bardell respondis, "Mi estas certa, ke mi devas esti feliĉa

virino." Poste, Sro. Pickwick diris, "Kaj via knabeto, li ankaŭ havos kunulon." Tiam mi aŭdis Sino. Bardell dirantan, "Ho! vi kara, bona, petolema karulo!" Kaj poste la sonon de ekploregado. Kaj la voĉo de Pickwick diris "Benu mian animon!! Sino. Bardell! mia bona virino! Dio mia, kia situacio! pripensu, mi petas, Sino. Bardell, se iu venus!"

*Buzfuz.* Dankon! Sino. Cluppins, dankon! Tio sufiĉas.

*Snubbin.* Mi ne deziras kontraŭekzameni tiun ĉi atestantinon.

*(Sino. Cluppins eliras el la atestantejo. Sensacio inter la ĵurintaro).*

*Skimpin.* Natanielo Winkle.

*Winkle.* Tie ĉi!

*(Winkle eniras en la atestantejon kaj kliniĝas antaŭ la juĝisto).*

*Juĝisto.* Ne rigardu min, sinjoro, rigardu la ĵurintaron.

*Skimpin.* Nun, sinjoro, bonvolu sciigi lian moŝton kaj la ĵurintaron pri via nomo.

*Winkle.* Winkle!

*Juĝisto.* Kiu estas via baptonomo, sinjoro?

*Winkle.* Natanielo, sinjoro.

*Juĝisto.* Danielo. Ĉu iu alia nomo?

*Winkle.* Natanielo! sinjoro, via moŝto, mi volas diri.

*Juĝisto.* Ĉu Natanielo Danielo aŭ Danielo Natanielo?

*Winkle.* Ne! via moŝto, nur Natanielo, tute ne Danielo.

*Juĝisto.* Kial, do, vi diris al mi, ke ĝi estas Danielo?

*Winkle.* Mi ne faris tion.

*Juĝisto.* Vi ja faris, sinjoro! Kiel mi povus havi Danielon sur mia notlibreto se vi ne estus dirinta ĝin, sinjoro?

*Skimpin.* Sro. Winkle havas iome mallongan memoron, via moŝto. Ni trovos rimedon por refreŝigi ĝin antaŭ ol ni tute finos pri li.

*Juĝisto,* Vi bone faros esti singardema, sinjoro.

(*Sro. Winkle kliniĝas*).

*Skimpin.* Nun, Sro. Winkle, atentu je mi, mi vin petas, sinjoro, kaj permesu al mi, rekomendi al vi por via profito, ke vi tenu en via memoro, la konsilon de lia moŝto, nome, esti singardema. Mi kredas, ke vi estas speciala amiko de Pickwick, la defendanto, ĉu ne?

*Winkle.* Mi estas koninta Sron. Pickwick nun, tiom, kiom mi memoras je tiu ĉi momento, dum preskaŭ . . . .

*Skimpin.* Bonvolu, Sro. Winkle, ne eviti la demandon. Ĉu vi estas, aŭ ne estas, la speciala amiko de la defendanto?

*Winkle.* Mi estis ĵus dironta, ke . . . .

*Skimpin.* Ĉu vi respondas, aŭ ne, al mia demando?

*Juĝisto.* Se vi ne respondos al la demando, sinjoro, vi estos arestata.

*Skimpin.* Nu! sinjoro, jes aŭ ne, mi petas.

*Winkle.* Jes, mi estas.

*Skimpin.* Jes, vi estas. Kaj kial vi ne povis tuj dirition, sinjoro? Eble vi konas ankaŭ la plendantinon. He! Sro. Winkle?

*Winkle.* Mi ne konas ŝin. Mi estas vidinta ŝin.

*Skimpin.* Ho! vi ne konas ŝin, sed vi estas vidinta ŝin. Nun, bonvolu diri al la sinjoroj ĵurintoj, kion vi intencas diri per tio, Sro. Winkle.

*Winkle.* Mi volas diri, ke mi ne estas intima pri ŝi, sed mi vidis ŝin kiam mi vizitis Sro. Pickwick en Goswell Strato.

*Skimpin.* Kiom da fojoj vi vidis ŝin ?

*Winkle.* Kiom da fojoj ?

*Skimpin.* Jes, Sro. Winkle, kiom da fojoj. Mi ripetos la demandon por vi dekdufoje se vi postulos tion, sinjoro.

*Winkle.* Estas tute neeble diri kiom da fojoj mi vidis Sinon. Bardell.

*Skimpin.* Ĉu dudekfoje ?

*Winkle.* Certe, pli ol tio.

*Skimpin.* Ĉu vi povus ĵuri, ke vi ne vidis ŝin pli ol sepdek-kvinfoje ?

*Winkle.* Mi ne povas diri.

*Juĝisto.* Vi bone faros esti singardema, sinjoro !

*Skimpin.* Nu, Sro. Winkle, ĉu vi memoras esti vizitinta la defendanton Pickwick en tiuj ĉambroj en la domo sur Goswell Strato unu specialan matenon en la monato Julio ?

*Winkle.* Jes ! mi memoras.

*Skimpin.* Ĉu vi estis akompanata de amiko nome Tupman, kaj de alia nomita Snodgrass ?

*Winkle.* Jes !

*Skimpin.* Ĉu ili ĉeestas ?

*Winkle.* Jes ! ili ĉeestas.

(*Rigardante serioze la lokon, kie sidas liaj amikoj.*)

*Skimpin.* Mi petas ke vi donu al mi vian atenton, sinjoro, kaj ne zorgu pri viaj amikoj. Nun, sinjoro, rakontu al la ĵurintaro tion kion vi vidis kiam vi eniris



en la ĉambro de la defendanto je tiu speciala mateno. Nu! eldiru tion, sinjoro; ni devas nepre tion scii pli malpli baldaŭ.

*Winkle.* La defendanto, Sro. Pickwick, tenis la plendantinon en siaj brakoj, kun la manoj ĉirkaŭ ŝia talio, kaj la plendantino ŝajnis esti sveninta.

*Skimpin.* Ĉu vi aŭdis la defendanton diri ion?

*Winkle.* Mi aŭdis lin nomi Simon. Bardell "bona estaĵino," kaj mi aŭdis, ke li petas ŝin trankviliĝi, ĉar jen estas situacio, se iu venos, aŭ vortojn laŭ tiu senco.

*Skimpin.* Nun, Sro. Winkle, mi nur havas ankoraŭ unu demandon por fari al vi kaj mi petas, ke vi memoru la konsilon de lia moŝto. Ĉu vi entreprenos ĵuri, ke Pickwick, la defendanto, ne diris je tiu okazo—"Mia kara Sino. Bardell, vi estas bonulino, kvietiĝu pri tiu ĉi situacio, ĉar al tiu ĉi situacio vi devos alveni"—aŭ vortojn laŭ tiu senco?

*Winkle.* Mi certe ne komprenis lin tiamaniere. Mi estis sur la ŝtuparo kaj ne aŭdis klare; la impresoj sur mia spirito estas. . . . .

*Skimpin.* La sinjoroj ĵurintoj ne deziras la impresojn sur via spirito, Sro. Winkle, kiuj, mi timas, ne tre utilis al honestaj sinceraj homoj. Vi estis sur la ŝtuparo kaj ne klare aŭdis; sed vi ne ĵuros, ke Pickwick ne uzis la esprimon, kiun mi citis? Ĉu mi bone komprenas tion?

*Winkle.* Ne! mi ne ĵuros.

(*Skimpin sidiĝas*).

*Phuncky.* Mi kredas, Sro. Winkle, ke Sro. Pickwick ne estas junulo.

*Winkle.* Ho, ne! sufiĉe maljuna por esti mia patro.

*Phuncky.* Vi sciigis al mia klera amiko, ke vi konas Sron. Pickwick de longe. Ĉu vi iam havis kaŭzon por

kredi aŭ supozi, ke li estis edziĝonta ?

*Winkle.* Ho, ne ! certe ne !

*Phuncky.* Mi eĉ iros pli antaŭen ol tio ĉi, sinjoro. Ĉu vi pri la maniero aŭ konduto de Sro. Pickwick rilate al la kontraŭa sekso iam vidis ion, kio decidigis vin kredi, ke li iam pripensadis pri edziĝo dum la lastaj jaroj iaokaze ?

*Winkle.* Ho, ne ! certe ne !

*Phuncky.* Ĉu lia konduto, kiam li havis aferon kun inoj, ĉiam estis tiu de viro kiu, atinginte maturan aĝon kaj kontenta je siaj propraj okupadoj kaj amuzajoj, agas kun ili nur kiel patro agus kun siaj filinoj ?

*Winkle.* Nenia dubo pri tio. Tio estas—jes—ho jes ! —certe !

*Phuncky.* Vi neniam sciis ion pri lia konduto je Sino. Bardell, aŭ je iu alia ino, iomete suspektindan ?

*Winkle.* N-n-ne ! Esceptinte je unu malgrava okazo kiun, mi ne dubas, oni povus facile klarigi.

(*Sro. Phuncky rapide sidiĝas*).

*Snubbin.* Vi povas elveni, Sro. Winkle.

*Buzfuz.* Haltu ! Sro. Winkle, restu ! Ĉu via moŝto bonvolus demandi al li, kio estas tiu ĉi sola ekzemplo de suspektinda konduto je inoj ĉe tiu ĉi sinjoro, kiu estas sufiĉe maljuna por esti lia patro.

*Juĝisto.* Vi aŭdas tion, kion diras la klera advokato, sinjoro. Priparolu pri la okazo, al kiu vi aludis.

*Winkle.* Via moŝto, mi prefere ne priparolus.

*Juĝisto.* Eble ! sed estas necese.

*Winkle.* Sro. Pickwick, do, estis unufoje trovata en la . . . dormoĉambro . . . de . . . sinjorino . . . noktomeze. Tio ĉi okazigis, mi kredas, la rompiĝon de la projektita edziniĝo de la dirita sinjorino, kaj okazigis,

mi scias, ke ili ĉiuj estis perforte alkondukitaj antaŭ Sron. George Nupkins, magistraton de Ipswich.

*Snubbin.* Vi povas foriri, sinjoro.

*(Winkle eliras el la ejo).*

*Buzfuz.* Alvoku Samuelon Weller.

*(Sro. Weller tuj eniras gaje en la ejon).*

*Juĝisto.* Kiu estas via nomo?

*Weller.* Sam Veller, via moŝto.

*Juĝisto.* Ĉu vi silabas ĝin per Vo aŭ Ŭo?

*Weller.* Tio dependas de la gusto kaj fantazio de la silabanto, via moŝto. Mi neniam havis okazon silabi ĝin pli ol unu aŭ du fojojn dum mia vivo, sed mi silabas ĝin per Vo.

*Voĉo (el la ĉeestantaro).* Tute prave! Samivel, tute prave! Skribu ĝin per Vo, via moŝto.

*Juĝisto.* Kiu estas tiu, kiu kuraĝas adresi min? Oficisto!

*Oficisto.* Jes, via moŝto.

*Juĝisto.* Alkonduku tien ĉi tiun personon.

*Oficisto.* Jes, via moŝto.

*(Konfuzado en la juĝejo).*

*Juĝisto.* Ĉu vi scias, kiu ĝi estis?

*Weller.* Mi inklinas pensi, ke tiu estis mia patro, via moŝto.

*Juĝisto.* Ĉu vi nun lin vidas?

*Weller (rigardante al la plafono)* Ne! via moŝto!

*Juĝisto.* Se vi estus povinta almontri lin, mi estus tuj arestiginta lin.

*Buzfuz.* Nun, sinjoro Weller!

*Weller.* Nun, sinjoro!

*Buzfuz.* Mi kredas, ke vi estas servisto ĉe Sro. Pickwick, la defendanton de tiu ĉi proceso. Elparolu, mi petas, Sro. Weller.

*Weller.* Mi intencas elparoli. Mi ja servadas tiun sinjoron—kaj tre bona servado ĝi estas.

*Buzfuz.* Malmulto por fari kaj multego por havi, mi supozas.

*Weller.* Ho, tute sufiĉo por havi, sinjoro, kiel diris la militisto kiam oni punordonis al li tricent-kvindek skurĝojn.

*Juĝisto.* Vi ne devas rakonti al ni tion, kion diris la militisto aŭ iu alia persono. Tio ne estas atestaĵo.

*Weller.* Bone, via moŝto!

*Buzfuz.* Ĉu vi memoras ion specialan, kio okazis la matenon kiam vi unue estis dungata de la defendanto, he, Sro. Weller?

*Weller.* Jes, sinjoro, mi memoras.

*Buzfuz.* Bonvolu rakonti al la ĵurintaro tion, kio tiam okazis.

*Weller.* Mi ricevis tute novan vestaron tiun matenon, viaj ĵurintaj moŝtoj, kaj tio estis tre speciala kaj malofta okazo por mi en tiu tempo.

*Juĝisto.* Vi bone faros esti zorgema, sinjoro.

*Weller.* Same diris al mi Sro. Pickwick je la tiama tempo, via moŝto, kaj mi estis tre zorgema pri tiu vestaro; ja tre zorgema, via moŝto.

*Buzfuz.* Ĉu vi intencas diri al mi, Sro. Weller, ke vi vidis nenion pri tiu ĉi sveno de la plendantino en la brakoj de la defendanto, kiun vi aŭdis priparolatan de la

geatestintoj ?

*Weller.* Certe ne ! Mi estis en la koridoro, ĝis ili alvokis min kaj tiam la maljunulino ne estis plu tie.

*Buzfuz.* Nun, atentu, Sro. Weller. Vi estis en la koridoro kaj tamen vi vidis nenion pri tio, kio okazis. Ĉu vi havas paron da okuloj ?

*Weller.* Jes, mi havas paron da okuloj kaj jen estas ja la afero. Se ili estus estintaj paron da patentaj duoblaj milione pligrandigantaj mikroskopoj kun ekstra potenco, mi eble estus povinta trarigardi tra ŝtuparo kaj ligna pordo ; sed ĉar ili estas nur okuloj, vi vidas, mia vido estas limigita.

*(Ĉiuj ridas kaj Buzfuz ŝajnas tre konfuzita).*

*Buzfuz.* Nun, Sro. Weller, mi faros al vi demandon pri alia punkto, se tio al vi plaĉos.

*Weller.* Se al vi plaĉos, sinjoro.

*Buzfuz.* Ĉu vi memoras esti alirinta al la domo de Sino. Bardell unu nokton en lasta Novembro ?

*Weller.* Ho, jes ! tre bone !

*Buzfuz.* Ho, vi ja rememoras tion, Sro. Weller. Mi pensis, ke mi fine alvenos al io.

*Weller.* Mi ankaŭ iome ekpensis tion, sinjoro.

*Buzfuz.* Nu ! mi supozas, ke vi tien iris por havi iom da babilado pri tiu ĉi proceso ; he ! Sro. Weller ?

*Weller.* Mi tien iris por pagi la luprezon ; sed ni ja ekparolis pri la proceso, sinjoro.

*Buzfuz.* Ho, vi ekparolis pri la proceso. Bonvolu rakonti al ni, sinjoro, tion kio estis dirata pri la proceso.

*Weller.* Kun la plej granda plezuro en la vivo, sinjoro. Post kelkaj negravaj rimarkoj de la virta ino

kiu estas ekzamenita tie ĉi hodiaŭ, la sinjorino ekmiregis pri la honorinda konduto de Sroj. Dodson kaj Fogg.

*Buzfuz.* La konsilantoj de la plendantino ! Nu, ŝi parolis tre laŭdmaniere pri la honorinda konduto de Sroj. Dodson kaj Fogg, la konsilantoj de la plendantino. Ĉu ne ?

*Weller.* Jes, ŝi esprimis sian kontentegon pri ilia granda malavareco pri tio, ke ili entreprenis la proceson spekulacie kaj ke ili demandas tute neniom kiel kostojn, escepte se ili povos akiri ilin de Pickwick.

*Buzfuz.* Estas tute senutile, via moŝto, provi ricevi ian atestaĵon de tiu ĉi atestanto, pro lia nepenetrebla malsaĝeco. Mi ne ĉagrenos la ĵurintaron, farante al li plimulte da demandoj. Malsupreniru, sinjoro !

*Weller.* Ĉu iu alia sinjoro dezirus demandi al mi ion ?

*Snubbin.* Ne mi, Sro. Weller, mi dankas.

*Buzfuz.* Vi povas malsuprenveni, sinjoro.

(*Sam elvenas al la ejo.*)

*Snubbin.* Mi ne kontraŭdiros, via moŝto, se tio evitigos la ekzamenon de alia atestanto, ke Sro. Pickwick estas sinjoro de grandega sendependa posedaĵo.

*Buzfuz.* Tre bone ! Tiu estas do mia proceso, via moŝto.

*Juĝisto.* Via ĵurintaj moŝtoj, se Sino. Bardell estas prava, estas tute klare, ke Sro. Pickwick devas esti malprava ; kaj se vi pensas, ke la atestaĵo de Sino. Cluppins estas kredinda, vi kompreneble kredos ĝin, kaj se ne, vi ne kredos ĝin. Se vi estas konvinkitaj, ke malplenumo de edziĝpromeso estas farita, vi aljuĝos al la plendantino tian monpunon, kian vi pensas justa, kaj, se aliflanke ŝajnas al vi, ke nenia edziĝpromeso estas iam

farita, vi aljuĝos por la defendanto kun tute nenia monpuno.

*(La juĝisto kaj la jurintaro foriras, kaj post mallonga tempo reeniras).*

*Oficisto.* Sinjoroj! Ĉu vi ĉiuj konsentas pri via juĝo?

*Ĉefjurinto.* Ni konsentas.

*Oficisto.* Ĉu vi juĝas por la plendantino aŭ por la defendanto?

*Ĉefjurinto.* Por la plendantino.

*Oficisto.* Kun kioma monpuno?

*Ĉefjurinto.* Sepcent-kvindek funtoj sterlingaj.

KURTENO.

RIMARKINDA PROPAGANDILO!

-----

# **Cigaredo Esperanto**

(Aprobata de D-ro ZAMENHOF).

Registered Trade Mark, No. 278,052.

AĈETEBLA ĈIE.

PREZOJ:

**SPECIALA KVALITO** (en VERDA kartona skatoleteto kun malgrandigita faksimilo de la VERDA STANDARDO sur ĈIU CIGAREDO). **9d. (1 fr.) por 20.**

**POPULARA KVALITO** (en KARMEZINA skatoleteto). **6d. (60 c.) por 20.**

—

**Tabaka Sindikato Esperantista,**  
**GLASGOW (Skotlando).**

Telegrafa Adreso: "VERDASTELO, GLASGOW."